

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ helmikuu ♦ februaro ♦ 1/2009



Malferma tago en la oficejo 14.12.08. En la bildo el la maldekstro sidante Ritva Sabelli, Eila Karvinen, Arvo Karvinen, Oili Piippo kaj Raimo Tanskanen, starante Tiina Oittinen kaj Tuomo Grundström.

Medalo de Setälä donacita al Heinola, p. 5

Talvipäivien ohjelma ♦ Programo de Vintraj Tagoj, p. 10

Retki Laatokan Valamoon ♦ Ekskurso al la Valamo de Ladogo, p. 16

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 64 as. 1, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ mmakita@utu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 050 365 0037 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhintaa/Prenumerationspris/Abonprezo: 22 e/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatku 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Börje Eriksson, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 ✉ esperarto@phnet.fi

Taneli Huuskonen, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli@poczta.onet.pl

Jukka Laaksonen, Orimuskatu 79 B 4, 33580 Tampere. ☎ (03) 2554 724 ✉ jvaleto@kolumbus.fi

Paula Niinikorpi, Männistöntie 8 C 29, 28120 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Teuvo Alavillamo, Leväsjoentie 535 C, 29810 Siikainen. ☎ 040 536 9728 ✉ fantomo@jippii.fi

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@kotikone.fi

Vilorg Teräväinen, Kaunisharjunpolku 3 E 61, 15800 Lahti. ☎ (03) 734 3978 ✉ vilorg@elmi.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): Sampo 800017-230825.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: <http://www.esperanto.fi>





Komuna lingvo de paco?

”La bela sonĝo de l’homaro por eterna ben” por ni esperantistoj estas komuna lingvo, kiu ebligas senperan komunikigon egale al ĉiuj kaj sen risiko de miskompreno.

Komuna lingvo, komunikigo, komprenigo – paco kaj kunlaboro. Jen klasika esperantisma penso. Prava, ĉar sen komunikilo ne estas komunikigo, kaj nur neŭtrala komunikilo estas egala. Malprava, ĉar komuniki ne memkompreneble signifas komprenigi, kaj – pli grave! – komprenigi ne aŭtomate signifas paciĝi.

En la verka momento de ĉi tiuj linioj ĵus okazadis ĉe la orienta fino de Mediteraneo terura buĉado de simplaj malriĉaj homoj, devigitaj vivi densege sur nekultivebla terpeco. Ili estas malesperaj, kaj malesperaj homoj kulpas malesperajn agojn. Tiuj malesperaj agoj estis pafi eksplodaĵojn trans limo apartiganta de normala sociekonomio. Bonvolo ne estas ebla sen bonfarto, sana socio ne estas ebla sen stabileco. Malesperiĝas tiu, al kiu mankas bonfarto kaj stabilo. Tridek procentoj el la loĝantoj de la Gaza sektoro estas junaj viroj, plejparto el ili sen ebleco al laboro, enspezo, vivteno per sia propra laboro. La ŝemidaj araba kaj hebrea parenkas kaj proksimas. Ilia problemoj ne estas lingvo, sed politiko, kiu malebligas normalan kunvivadon.

En la naŭdekaj jaroj Eŭropo pruvis, ke ĝi ne kapablas malebligi militon kun ampleksa teroro en la procezo de dispeciĝo de federacia lando, Jugoslavio. La kontraŭdiroj en Balkano ne estis lingvaj, la serbokroata lingvoformo

bone funkciis. Estis aliaj faktoroj – kaj la bazo de ĉiuj faktoroj finfine estas tio, ke unuj havas, aliaj malhavas, kaj unuj ne emas pri maljustaj privilegioj rezigni.

En Afriko estas malmultaj landoj kun indigena lingva unueco. Unu estas Somalio, kies disfalo kiel ŝtato antaŭ dudek jaroj rezultis multnombrajn rifuĝintojn, unuafoje afrikajn, ankaŭ en Finnlando. La somaloj restis finlandaj, ĉar en la Afrika Korno ĝis hodiaŭ daŭras senordo kaj malsekuro – ŝtato fakte ne ekzistas. La popolo kaj la klanestroj, militestroj, parolas la saman lingvon, sed ne permesas al homoj paroli por rekonstrui socion. Kial? Ĉar ili ne volas rezigni pri sia pozicio en la supro de maljusta piramido. – Alia lando lingve unueca estas Ruando, kie amasoj estis organizitaj sisteme mortigadi homojn indikitajn kiel ”aliaj” – laŭ etna diferenco artefarite difinita kaj akcelita de la belga ekskolonia administracio.

Malfeliĉan historion de civila milito havas eĉ Finnlando de antaŭ naŭdek jaroj, kaj en ambaŭ partioj oni parolis ambaŭ landajn lingvojn. En postaj jardekoj simila historio ripetiĝis en vastaj landoj, ankaŭ en regionoj preskaŭ tutkontinente unulingvaj.

Estas diversaj komunlingvoj. Tiuj ligas homojn en komunumojn. Ene de tiuj komunumoj homoj kreas interrilatojn, kaj inter tiuj komunumoj homoj decidas pri ties interrilatoj. Ja ni esperantistoj ne estas naivaj. Ni ne asertas, ke nia komuna lingvo estus miraklo donanta absolutan benon. Ni asertas, ke ĝi estas la plej taŭga ebleco al justoserĉa lingvopolitiko, proponante la verkon de Zamenhof al la mondo.

Tuomo Grundström

Kie vivanta kulturŝanĝo inter Finnlando kaj Svedio?

En januaro la finnaj novaĵoj raportis, ke en Svedio kreskis diskuto pri la stato de la sveda lingvo en Finnlando. La plej granda ĵurnalo de Svedio, Dagens Nyheter, publikigis artikolojn, kie skribantoj zorgis, ke finnoj malpli bone ol antaŭe parolas la svedan, ekzemple ke multaj finnaj universitataj studentoj parolas ĝin jam nur en turisma nivelo.

La malkresko de la sveda lingvo en Finnlando videblas ankaŭ en statistikoj, kie la kvanto de svedlingvanoj malrapide, sed daŭre malkreskas, kaj en studenta ekzameno malkreskanta kvanto ekzameniĝas pri la sveda. Antaŭ kvar jaroj oni forigis devon de ekzameno pri la sveda lingvo, kaj nun jam nur 73 procentoj de studentoj elektas ĝin.

Ofte tamen la debato pri scipovo de fremdaj lingvoj tro multe koncentriĝas al la lerneja instruado. Ni devus memori, ke nura deviga partopreno en instruado ne igas homojn lerni, se ili ekster la lernejo ne vidas bonajn motivojn lerni la koncernan aferon. La mondo abundas pri ekzemploj pri tio, ke lernejoj nur sidas ĉe la lecionoj, trairas la ekzamenojn je minimumaj postuloj – kaj poste forgesas eĉ tion malmulton, kion ili eventuale intertempe lernis. Tio koncernas ne nur lingvoinstruadon, sed instruadon de kiu ajn fako.

Ni ne studas por lernejo, ni studas por la vivo. En vivo de junuloj grava estas ne nur lernejo, tie estas ankaŭ vivanta kulturo en formo de muziko, filmoj, kontaktoj kun aliaj junuloj, koniĝo kun la vasta mondo kaj ankaŭ lernado de sia propra metio. Se la sveda socio volas konscie kaj racie subteni la vivadon de la sveda lingvo en Finnlando, indas ankaŭ pensi pri tiuj faktoroj. Anstataŭ postuli kaj subteni nur lingvoinstruadon Svedio povus ankaŭ konsideri jenajn: antaŭen-

igi importon de svedaj muziko kaj filmoj en Finnlandon, reklami eblecojn vojaĝi en Svedio kaj informi pri eblecoj por studi en Svedio. (Same povas nature fari Finnlando en Svedio.)

Se oni aŭskultas diversajn radiokanalojn en Finnlando, speciale la porjunularajn, estas frape atenti pri la lingvaj cirkonstancoj de ilia muziko. La finnlingva junulara radio Yle-X aŭdigas muzikon ĉefe en la finna kaj en la angla, nur malofte en la sveda. La svedlingva junulara radio X3M aŭdigas muzikon ĉefe en la angla, iom en la sveda – sed preskaŭ nenion en la finna. Strange forta baro en tiu rilato, ĉar la du lingvogrupoj ĝenerale ja estas neniel izolitaj, ja preskaŭ ĉiuj svedlingvaj junuloj nuntempe lernas flue paroli la finnan.

En Finnlando estas diversaj opinioj pri la sveda lingvo, iuj finnlingvanoj aktive uzas kaj favoras ĝin, dum aliaj tute rifuzas, sed ĝenerale klara majoritato de finnoj vidas la svedan esti valora parto de la finna socio kaj ke Finnlando havas utilon pri la dulingveco, kiel oni povas interrete vidi en ĵusa enketo:

http://www.magma.fi/images/stories/magma_rapport_090121.pdf

Samtempe tamen la finnoj konfesas, ke ilia propra scipovo de la sveda ne estas bona, kaj signifa parto taksas, ke iam la sveda malaperos el Finnlando. Ankaŭ mi pensas, ke se la cirkonstancoj restas kiel nun kaj vivanta kulturŝanĝo inter Svedio kaj Finnlando ne aktiviĝos, en ia tempokemo tio estos la realo.

Mikko Mäkitalo



Festotago en Heinola

Okaze la Zamenhofa tago tri reprezentantoj de EAF (Aila Havia, Hilkka Galle, Börje Eriksson) partoprenis en la "Malnovstila julevento" kiun la muzeo de la urbo Heinola aranĝis la 13.12.08 en korto kaj ene de la urba muzeo. EAF ja havis siajn aŭtunajn tagojn en la urbo kies muzeo havas grandan kolekton de medaloj. Nun la muzeo ankaŭ ricevis medalon kiu estas farita honore al la fama finna esperantisto Vilho Setälä.

En la bele ornamita korto estis multaj vendistoj kiuj vendis bakaĵojn, diversajn manfaritajn ornamaĵojn kaj aliajn objektojn, bildkartojn, vestaĵojn, ludilojn, kandelojn k.t.p. kion oni vendas antaŭ Kristnasko. Publika ne mankis,

sed vendistoj kaj produktoj estis multaj, do restis ankoraŭ por venontjara julevento. Estis ankaŭ diversaj programeroj, muzikantoj, Sankta Lucia, "stelknabetoj" (tiernapojat) kaj jul-koboldoj kaj la Julavo kompreneble. La eventon aranĝis Heinola-Seura kaj en la hejmpaĝo de tiu societo oni trovas multajn bildojn de la evento (sed ne pri la esperantistoj): http://artos.pp.fi/heinola-seura/galleria/wanhan_ajan_joulu_2008/wanhan_ajan_joulu_2008.htm

Ni tamen havis lokon por nia informtabulo en la arta muzeo kie ankaŭ la kafejo estis kaj multaj gastoj preterpaŝis kaj multaj haltis kaj babiladis kun ni. Surprizo estis ke vizitis multaj personoj kiuj iam mem aktivadis aŭ kiuj konis personojn kiuj aktivadis en Heinola E-klubo.

Sur la informtabulo estis preskaŭ sama teksto kiel en "la diplomo" kiu estis donita kun la medalo. La verdblanka informtabulo estis ornamita kun julatributoj. Apud ĝi estis la Tamperea kongreslibro kun bildo de ĉi-jara Nobelacpremiito (kiu estis alta protektanto de la UK en Tampere) kaj ankaŭ ekzemplero de Kalevala, vortaro kaj dudeko de la jubilejara Esperanta Finnlando kiuj ĉiuj estis fordonitaj. La evento daŭris ekde la 10 ĝis la 13 kaj ni prenis kelkajn fotojn, tamen ne havis digitalan fotilon, do la de paperaj fotoj skanitaj bildoj ne estas ege bonkvalitaj.

Bedaŭrinde oni ne ĉiujare donacas medalon al Heinola!

Börje Eriksson

**Informtabulo de
Esperanto en Heinola.**



Supre: Hilka Galle, Aila Havia kaj muzea estro Kari-Paavo Kokki.

Malsupre: Hilka Galle, Julavo kaj Aila Havia.



Vilho Setälä kaj medalo

Vilho Setälä (1892–1985) komencis lerni Esperanton jare 1906

kaj ekaktivis en Eo-movado en la 1910-aj jaroj, i.a. iĝis delegito de UEA, fondis Esperanto-Instituton, redaktis gazeton Esperanta Finnlando entute dum tri jardekoj kaj verkis kaj tradukis plurajn librojn en Esperanto. Honora membro de UEA li iĝis 1933 kaj membro de Akademio de Esperanto 1930, prezidanto de EAF li estis 1955–1963. Fondumo Esperanto iĝis fondita 1955 kaj heredis lian posedaĵon post lia morto.

Librojn Setälä publikigis ankaŭ pri aliaj aferoj ol Esperanto, speciale pri fotografio. EAF elektis lin honora prezidanto jare 1979 kaj nia gazeto nomumis lin la plej grava finna esperantisto en voĉdono, kies rezulto estas anoncita en numero 2/2007.

Okaze de 90-jariĝo de Setälä EAF farigis medalojn pri li. La medalon desegnis Heikki Varja, unu el la plej gravaj tiatempaj medal-desegnistoj. La iniciaton pri la medalo faris Ahto Linja.

Mikko Mäkitalo



Lidia Zamenhof kaj Wendy Heller kaj Bernhard Westerhoff invitas trafoliumi familiajn notojn dum la jubilea jaro de doktoro Esperanto festota en Bjalistoka UK somere 2009 en Pollando.


”Lidia” de Wendy Heller legebla nun en Esperanto

Usonanino Wendy Heller verkis 1985 fascinan biografion de Lidia Zamenhof. Tre favore recenzis ĝin siatempe kaj William Auld kaj Marjorie Boulton. La aŭtoro devis serĉi materialon pri la filino de d-ro Zamenhof en ĉiuj kontinentoj. Post sesjara streĉa laborado la libro estis finfine preta. Aperis el multaj vidpunktoj rara kreaĵo. Vera juvelo de primovada literaturo trovis sian vojon al la angleparolanta publiko. Tiel alloga estis la temo, ke mi ŝvite studis la anglalingvan tekston per helpo de vortaro. Nigriĝis la paĝoj de mia konsultilo, ĉar ege ofte mi devis foliumi ĝin. Estas menciinde, ke la oferita peno portis fekundan rikolton.

Nun estas al mi granda plezuro rakonti, ke la germano Bernhard Westerhoff dum la pasinta jaro 2007 esperantigis la menciitan, el multaj vidpunktoj grandiozan vivorakonton. Tuj mi rapidas gratuli kaj danki pro la persista kaj fruktodona laboro al nia germana samideano. La originalo donis al mi multajn ravajn momentojn ĉe vespera legolampo, kaj perfekta tradukista laboro levis mian ĝojon ĝis plafono. Tre flue kaj glate kuras interpretitaj linioj preter legantaj okuloj. Fragmente farita laŭlegado plifortigis mian impreson pri sukcesa lingvo-uzado de Bernhard Westerhoff. Poeziaj trajtoj en la teksto konkretiĝas plej facile dum tiaj legadaj ekzercoj. Por kontroli miajn asertojn pri la valoro de la fidela traduko uzu mian voĉlegadan metodon.

Proksimiĝas la 150-a datreveno de la naskiĝo de Ludoviko Zamenhof. Indas kunpreni la filinon Lidia (1904-1942) por akompani dum la festojaraj manifestacioj. Wendy Heller raportas tre detale kaj kun varma koro pri vivofazoj de sia samreligiemulino. Certe estos multaj novaj trovaĵoj ankaŭ por spertaj esperantistoj. La fotoj estas sukcese kopiitaj en tiu ĉi eldono publikigita 2007 en Antverpeno. Ne indas ripeti ĉi tie iujn apartajn detalojn pri la enhavo. Sufiĉu la mencio, ke la verko estas laŭsignife monumenta el la vidpunkto de enhavo kaj stilo. Verŝajne multaj legantoj haltas ĉe la aŭtora enkonduko kaj tuj relegas ĝin. La prefaco kortuŝe lumigas la kernan signifon de la internacia lingvo Esperanto. La aŭtorino tre simpatie kaj varme prezentas siajn spertojn neforgeseblajn inter nunaj kaj jam forpasintaj samlingvanoj. Bonvolu permesi lakonan konkludon: Nepre leginda libro pro la brile plenumita traduklaboro de Bernhard Westerhoff.

Jorma Ahomäki



LIDIA – The Life of Lidia Zamenhof, Daughter of Esperanto de Wendy Heller. George Ronald Publisher Ltd 46 High Street, Kidlington, Oxford 1985, OX5 2DN, 260 p.

LIDIA – La vivo de Lidia Zamenhof, Filino de Esperanto de Wendy Heller. Tradukis el la angla Bernhard Westerhoff; Flandra Esperanto-Ligo Antverpeno 2007, 389 p.

Brajla skribo portas informojn al vidhandikapitoj

En la jaro 2009 blinduloj celebros la 200-jaran jubileon de Louis Braille, kiu evoluigis punktoskribon, brajlan skribon. Louis Braille, filo de franca selofaristo naskiĝis 6.1.1809. Li blindiĝis kiel 6-jara knabo en ludo per aleno. Louis Braille inventis sian punktoskribsistemon en la 1820-jaroj en blindullernejo en Parizo, kie li studis kaj pli poste instruis. Kiam li evoluigis la punktoskribsistemon por blinduloj, eĉ ĉiuj vidantoj ne scipovis legi kaj skribi. Kvankam produktado kaj palpado de tiam uzata reliefo-skribo estis malfacila, instruistoj ne akceptis la punktosistemon de Louis Braille.

Blinda Louis estis rare kuraĝa, inteligenta kaj progresema. Lia genia, simpla skribsistemo ankoraŭ estas uzata.

Baza figuro de ses punktoj

Brajla skribo baziĝas sur sespunkta grupo de etaj punktoj. El tiu bazo elektita punktofiguro signifas certan literon. Fingroj scipovas distingi foje maksimume ses punktojn.

Pli malfacile ol skribi estas legi brajlan tekston. Legado, palpado, postulas sentemajn fingrojn kaj paciencon.

Punktojn oni skribas sur iom pli dikan paperon pere de brajla skribmaŝino, speciala komputilo aŭ uzante tabulon kaj pinĉilon. Pere de

pinĉilo oni trapikas punktojn sur paperon kiu troviĝas inter du platoj. Sistemo de tabulo kaj pinĉilo postulas bonan konon de punktoj, ĉar literojn oni skribas tra plato de dekstre maldekstren, do spegulfigure.


Daŭre evoluanta skribsistemo

Kono de brajla skribo signifas por vidhandikapitoj kaj surdbinduloj talenton legi kaj skribi. Tial brajla sistemo estas daŭre evoluata por respondi al novaj postuloj. Ĝi konvenas bonege al moderna informadiko. Ekzemple eŭro kaj heliko (@) havas siajn punktoliterojn. Pere de brajla ekrano kaj printilo eblas produkti diversajn dokumentojn en por vidhandikapitoj konvena formo.

Lastatempe oni komencis uzi brajlon en publikaj ejoj kaj marki kelkajn produktojn brajle, ekz. pakaĵojn de medikamentoj.

Vidhandikapitaj infanoj lernas brajlon en lernejo samtempe kiam iliaj samaĝuloj lernas legi kaj skribi. Homoj, kiuj perdis vidpovon pli poste, povas lerni brajlon en kursoj. Kiu ajn, kiu interesigas pri brajlo, povas lerni ĝin memstare uzante studmaterialon "Pisteitä päin" de Näkövammaisten Keskusliitto.

Ritva Sabelli



| | | | | | | | | | |
|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|
| A | B | C | D | E | F | G | H | I | J |
| • | • | •• | •• | •• | •• | •• | •• | •• | •• |
| K | L | M | N | O | P | Q | R | S | T |
| • | • | •• | •• | •• | •• | •• | •• | •• | •• |
| U | V | W | X | Y | Z | Ä | Å | Ö | |
| •• | •• | •• | •• | •• | •• | •• | •• | •• | |

Pri instruado de blinduloj

Pasintomere Sylvia Hämäläinen el Ylöjärvi gvidis 2-tagan kurson de vidhandikapitoj. Laŭ peto ŝi faris notojn pri ŝiaj spertoj pri instruado de blinduloj. Jen ŝiaj konsiloj, kiujn Steleto volas peri pere de ĉi tiu revuo por kuraĝigi instruistojn instrui nevidantojn kaj malfortevidantojn.

Kelkaj konsiloj

Tutan tempon tenu en la memoro ke la studentoj ne vidas. Ĉiujn sciojn vi devas doni buŝe, ĉar fari notojn estas malfacile. Plej facile estas se haveblas lernolibro kun gramatikaj konsiloj. Rakontu kiel skribi novajn vortojn, kiuj ne estas surpapere kaj kiuj havas iun por finnoj fremdan sonon.

Ekzercu prononcadon komence de la kurso. La instruanto tre klare prononcu la vortojn.

Havu paŭzojn kun kantoj aŭ esperanta muziko. Surloke movigaj ludoj aŭ kantludoj estas bonaj.

Postulas tempon serĉi novan lokon aŭ vorton en la libro. Atendu pacience.

Kelkaj postuloj

Plej oportune estas se la studentoj havas brajle skribitan libron aŭ alian anticipe preparitan materialon kaj la instruanto la saman libron kaj materialon en normala skribo.

Estas bone se la novaj vortoj aperas ĉe la koncerna ĉapitro kaj plej volonte tuj sub la teksto. La brajlaj libroj estas grandaj kaj postulas grandan lokon sur la komuna tablosurfaco. Aparta vortaro, verŝajne, malrapidigus la antaŭeniron.

Estas jam prunteblaj brajle en la blindula biblioteko la libroj *Forsman: Egaleco kaj paco per esperanto* kaj *Zagreba metodo*.

Sylvia Hämäläinen

ALIĜILO

Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF
14.-15.3.2009 en Kouvola.

Nomo _____

Adreso _____

Tel./Fakso/Ret-adreso _____

Aliĝkotizo

18 e ĝis 28.2.2009 _____

21 e poste _____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo. Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

VT-paketo _____ 86 e/persono (inkl. tranoktadon en 2-lita ĉambro, tagmanĝojn ambaŭtage, kafon kaj vespermanĝon sabate)

Krompago por 1-lita ĉambro: _____ 30 e/persono

VT-paketo sen tranoktado: _____ 50 e/persono (inkl. la manĝojn menciitaj supre)

Entute pagenda al la konto de EAF _____

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825.
Bv. uzi la VT-referencnumeron **4640 (ne skribu aliajn informojn en pagilo)**.

Pliaj informoj aŭ deziroj al EAF:

Bonvolu sendi la aliĝilon al:
Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
Retaj aliĝoj tra eafmendoj@esperanto.fi

BONVENON!

ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton talvipäiville 14.-15.3.2009 Kouvolaan.

Nimi _____

Osoite _____

Puh./fax/sähköposti _____

Ilmoittautumismaksu:

18 e 28.2.2009 asti _____

21 e 28.2.2009 jälkeen _____

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset. Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

Talvipäivien paketti ___ 86 e/hlö
(sis. majoituksen 2 hengen huoneessa, 2 lounasta, päiväkahvin ja iltapalan lauantaina)

1 hengen huoneen lisämaksu ___ 30 e/hlö

Talvipäivien paketti ilman majoitusta ___ 50 e/hlö (sis. yllä mainitut ruokailut)

Maksut yhteensä Suomen Esperantoliiton tilille _____

Tilinumero: Sampo 800017-230825.

Käytä viitenumeroa **4640** (ei muita tietoja viite- tai viestikenttään maksun yhteydessä).

Lisätietoja ja/tai toivomuksia _____

Lähetä lomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto

Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki

tai tiedot s-postitse eafmendoj@esperanto.fi

TERVETULOA!



Otto Prytz

Vintraj tagoj de EAF okazos ĉi-jare en Kuu-sankoski, nun parto de la urbo Kouvola. Hotelo Sommelo, kiu situas en belega loko ĉe la rivero Kymijoki, bonvenigos nin. La hotelo estas facile atingebla buse de la stacidomo de Kouvola.

La tagoj komenciĝos sabate per komuna lunĉo je la 12a. Malfermo okazos je la 13a. Antaŭtagmeze ni aranĝos publikan prezentadon de Esperanto al interesuloj kaj lasos tempon por renkontiĝo kun amaskomunikoj.

Pri la programo respondecas plejparte la 90-jara membroasocio Steleto, kiu prezentos multflanke sian agadon. La prelegantoj de Steleto estas Raimo Tanskanen kaj Arvo Karvinen. La ĉefpreleganto, Otto Prytz el Norvegio, havos tri prelegojn kun diversaj temoj.

Ankaŭ la brajla skribo estos prezentata al ni. Nun ja estas la 200-naskiĝdatreveno de Louis Braille, kreinto de la brajla sistemo. En la ekspozicio ni povos konatiĝi kun brajlaj tekstoj kaj kun skribmaŝino kun tabulo kaj pinĉilo. Steleto-anoj montros la uzadon de ili kaj interesuloj povos mem provi legi kaj skribi.

Sabate posttagmeze estos rezervita tempo por ĉiuj membroasocioj, kiuj deziras kunveni dum la VT. Bonvolu informi pri viaj bezonoj al la aranĝantoj de EAF kaj interkonsentu pri la tem-

Vintraj Tagoj 2009 en Kouvola

Talvipäivät Kouvolassa 14.-15.3.2009

Esperanto inter blinduloj – Steleto 90-jara

Esperanto ja sokeat – Suomen sokeiden esperantoyhdistys Steleto 90-vuotias

Kunvenejo: Hotelli Sommelo, Pallokentäntie 2, 45700 Kuusankoski

po. Notu, ke dum la tagoj okazos ankaŭ la jam tradicia renkontiĝo de membroj de la subtena asocio de EAF, Societo Nino Runeberg.

Sabate ni vesperumas kune. Steleto-anoj aranĝas plejparte ankaŭ la vesperan programon, inter ili estas multaj muzikaj kaj aliaj artistaj talentuloj. Certe nin atendas distra kaj hejmeca ĉeestado. Ankaŭ la unua verkisto en finlingva dialekto, Hjalmar Nortamo, tradukiĝis Esperanten kaj nin kantigos.

Dimanĉe matene KELF verŝajne aranĝos la tradician matenpreĝon. Je la 9.30 komenciĝos kontrolo de la rajtigiloj por la jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando, kiu okazos ekde la 10a. Post ĝi ni lunĉos kaj daŭrigos la kunestadon kun la tria prelego de s-ro Prytz.

★

Tämän vuoden talvipäivät järjestetään Kuusankoskella, joka vuoden alussa liittyi Kouvolan kaupunkiin. Kokouspaikka on hotelli Sommelo, joka sijaitsee luonnonkauniin Kymijoen rannalla. Kuusankoskelle on hyvät bussiyhteydet esim. Kouvolan rautatieasemalta.

Päivät alkavat yhteisellä lounaalla lauantaina klo 12. Avajaiset ovat klo 13.00. Aamupäivällä järjestämme jo totuttuun tapaan esperanton esitelytilaisuuden yleisölle sekä tapaamme todennäköisesti tiedotusvälineiden edustajia.

Päivien teema on merkittävän jäsenjärjestöme Suomen sokeiden esperantoyhdistys Steleton 90-vuotinen toiminta. Steleton luennoitsijat ovat Arvo Karvinen ja Raimo Tanskanen.

Pääluennoitsijaksi saapuu maailmanlaajuisesti tunnettu esperantisti Otto Prytz Norjasta. Esitelmät ja muut esitykset pidetään esperantoksi, suomeksi tietoja voi saada tauoilla ja illanvieton aikana.

Tutustumme myös pistekirjoitukseen ja voimme itse kukin kokeilla sen lukemista ja kirjoittamista steletolaisten opastuksella. Kuluva vuosi on Louis Brailleen, pistekirjoituksen keksijän, syntymän 200-vuotisjuhlavuosi.

Lauantai-iltapäivällä jäsenjärjestöt voivat järjestää omia kokouksiaan tarpeen mukaan. Sopikaa kellonajasta ja kokoustiloista Esperantoliiton järjestäjien kanssa hyvissä ajoin. Päivien aikana järjestetään myös jo perinteeksi muodostunut Nino Runeberg -seuran jäsentapaaminen.

Lauantai-iltaa vietämme yhdessä. Steletolaiset ovat luvanneet järjestää myös viihdyttävää iltaohjelmaa, heidän joukossaanhan on paljon esim. muusikoita. Yhdessäolosta muodostuu varmasti mukava ja lämminhenkinen. Myös ensimmäisen suomalaisen murrekirjailijan Hjalmar Nortamon esperantoksi käännetty lyriikka laulattaa.

Sunnuntaiaamuna KELF järjestää perinteisen aamuhartauden. Kello 9.30 alkaa valtakirjojen tarkastus Suomen Esperantoliiton vuosikokousta varten, kokous aloitetaan klo 10.00. Lounaan jälkeen on vuorossa Otto Prytzin kolmas luento myös mielenkiintoisesta aiheesta. Päivien päätös on noin klo 14.00. ▷

Programo – Ohjelma (ŝanĝoj eblas – muutokset mahdollisia)

Sabato / Lauantai, 14.3.2009

- 11.30–12.00 Konatiĝa prezento de Esperanto.
Esperanton esittelytilaisuus.
- 11.30 Malfermo de akceptejoj. Vastaanotto avataan.
- 12.00 Lunĉo. Lounas
- 13.00 Bonvenigaj vortoj kaj malfermo de la tagoj. Tervetulosanat ja päivien avaus.
- 13.15 Prelegoj kun paŭzoj. Luentoja taukojen kanssa.
Raimo Tanskanen: Agado de Steleto dum 90 jaroj. Steleton 90-vuotinen toiminta.
Otto Prytz: Pri brajla konferenco en Parizo. Pariisin pistekirjoituskonferenssista.
Otto Prytz: Kial Esperanto ne ludas la saman rolon inter blinduloj nun kiel dum la intermilita tempo? Miksei esperanton merkitys sokeille ole enää sama kuin aikaisemmin?
Arvo Karvinen: Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj provas trovi sian lokon en internacia kunlaboro de blindul-organizoj. Sokeiden kansanvälinen esperantojärjestö etsii paikkaansa sokeiden kansainvälisessä toiminnassa.
Konatiĝo kun brajla skribo. Ekspozicio de Steleto en la kunvenejoj.
Tutustuminen pistekirjoitukseen. Kokoustiloissa Steleton näyttely.
- 16.00 Kafo. Kahvi
- 16.30 Kunvenoj de membroasocioj laŭ alvokoj. EAF:n jäsenjärjestöjen kokouksia kokouskutsujen mukaan.
- 18.15 Akcepto de Societo Nino Runeberg (nur por membroj). Vastaanotto Nino Runeberg-seuran jäsenille.
- 18.30 Vespermanĝo. Illallinen.
- 19.30 Vespera programo: muzikaj kaj artaj prezentadoj, i.a. poemoj de Hjalmar Nortamo esperante. Steletanoj, Tuomo G. k.a. Yhtei-

nen illanvietto musiikin ja muiden esitysten merkeissä, mukana myös Nortamon runoja esperantoksi.

21.00 Libera kunestado en hotelo. Vapaata yhdessäoloo hotellilla.

Dimanĉo / Sunnuntai, 15.3.2009

- 9.00 Matenpreĝo de KELF. / Aamuhartaus, järj. KELF.
- 9.30 Kontrolo de rajtigiloj. Valtakirjojen tarkastus.
- 10.00 Jarkunveno de EAF. Vuosikokous.
- 12.00 Lunĉo. Lounas.
- 13.00 *Otto Prytz:* Brajlo – ĉu anakronismo en tekнике progresinta mondo? Onko piste-kirjoitus vanhentunut ilmiö nykyisessä teknistyneessä maailmassa.
- 14.00 Fermo de la tagoj. Päivien päätös.
- 14.30 Ekveturo hejmen. Kotimatka alkaa.

Aliĝo kaj kontaktpersonoj

Bonvolu sendi la aliĝilon al la EAF-oficejo de Helsinki aŭ se vi volas aliĝi rete, uzu la adreson eafmendoj@esperanto.fi. Krome pagu la kotizon al la konto de la Asocio uzante la referencnumeron. Notu, ke estas tre grave fari ambaŭ: kaj pagi kaj sendi la aliĝilon por ke ni organizantoj scios, kiu volas kion dum la VT. Pri la aliĝiloj kaj pagoj prizorgas Päivi Saarinen.

Kun eventualaj demandoj pri VT-aranĝoj, programo, tranoktoj, manĝoj, vojaĝeblecoj ktp. vi povas turni vin al EAF-vicprezidanto Päivi Saarinen aŭ al EAF-sekretario Tiina Oittinen, kies kontaktinformoj estas sur paĝo 2.

Kontaktulo de Steleto: Ritva Sabelli, tel. 09-635902, steleto@pp.inet.fi. Loka kontaktulo en Kouvola: Marjaliisa Parpala, tel. 040-7174521 (ankaŭ tekstmesaĝoj), retpoŝto mlparpala@luukku.com.

Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt

Ilmoittaudu lähettämällä ilmoittautumislomake Suomen Esperantoliiton toimistoon tai kerto-

malla vastaavat tiedot sähköpostitse osoitteen *eafmendoj@esperanto.fi*. Maksa osallistumis- ja pakettimaksut ilmoittautumisen mukaisesti liiton tilille. Muista käyttää viite-numeroa, jonka kanssa ei pidä kirjoittaa muita tietoja, koska silloin liitto joutuu maksamaan ylimääräisiä pankkikuluja. Huomaa myös, että pelkkä maksun hoitaminen ei riitä, tarvitsemme myös ilmoittautumistiedot, jotta tiedämme mitä olet tilannut ja milloin tulet.

Ilmoittautumislomakkeista ja maksuista huolehtii Päivi Saarinen. Lisätietoja talvipäivien

ohjelmasta, majoituksesta, ruokailusta ja matkustusvaihtoehdoista voit tiedustella liiton varapuheenjohtaja Päivi Saariselta tai sihteeriltä Tiina Oittiselta, yhteystiedot sivulla 2. Steleton yhteyshenkilö on Ritva Sabelli, 09-635902, *steleto@pp.inet.fi*. Paikallinen yhteyshenkilömme on kouvolaalainen Marjaliisa Parpala, puhelin 040-7174521 (myös tekstiviestit), sähköposti *mleparpala@luukku.com*.

*Tervetuloa – Bonvenon!
Estraroj de EAF kaj Steleto*

Vivprotokolo

Otto Bernt PRYTZ, n. 3an de junio 1943 en Steigen (norda Norvegio). Ret-adreso: *pilotto@online.no*

Universitataj studoj en Oslo pri filozofio, psikologio kaj logiko, la latina lingvo kaj pri fonetiko kaj lingvistiko, rusaj kaj hispanaj lingvo kaj literaturo.

1969: Baza ekzameno pri lingvistiko kun fonetiko, akiro de la titolo "candidatus magisterii".

1972: Ĉefa ekzameno (kun diplomlaboro) pri hispana lingvo, akiro de la titolo "candidatus philologiae"

Lekciisto pri hispana lingvo ĉe la Universitato de Oslo.

Scio de naciaj lingvoj:

Norvega, Hispana, Angla, Germana, Rusa, Franca, Latina, Finna, rudimente, Groenlanda studita.

Priesperantaj informoj:

1955-56: Deviga lerno de Esperanto en porblindula lernejo en Trondheim (Norvegio).

1972: Plenumo de Instruista Ekzameno de NEL.

1971-2001: Aparteno al la estraro de NEL.

Ekde 2004: Membro de Akademio de Esperanto.

En periodoj dum la 1960-aj kaj 1970-aj jaroj: Aparteno al la estraro de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj.

Publikigaĵoj en kaj pri Esperanto:

"Lingva komunikado kiel problemsolvado", unue prezentita kiel IKU-prelego dum la UK en Havano 1990, kaj en hispanlingva versio ("Comunicación lingüística como proceso de solución de problemas") kiel prelego ĉe la Kuba.

Scienca Akademio samjare; poste publikigita en Scienca Revuo 1994, kaj, en iom komprimita formo, prezentita kiel prelego dum kongreso pri aplikata lingvistiko en Szombathely (Hungario) 1998, kaj aperinta hungarlingve en ties Aktoj.

"Etnolingve unu, Esperantlingve pluraj: la nuancorico de Esperanto", prelego dum E-seminario en Karlskoga (Svedio) 1996 kaj publikigita en La Espero, organo de Sveda E-Federacio.

"Karakterizo de la infinitivo ĝenerale kaj de la Esperanta infinitivo speciale", en "Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke", 2001.

Multaj publikigaĵoj pri hispana lingvistiko.

Literatura publikigaĵo:

Tri literaturaj tradukoj el la hispana en la norvegan en la antologio Spania forteller (Hispanio rakontas), Oslo 1999.

Pri-brajla agado:

Iam dum la 1980aj jaroj: Ellaboris brajlajn reprezentojn de la apartaj literoj de la nord-samea lingvo.

1990: Ellaboris proponon de 8-punkta (komputila) brajla versio de la karaktraro "IBM PC CodePage 850".

Ekde 1995: Prezidanto de la norvega publika komisiono pri brajlo, kiu normigis diversajn fakajn notaciojn en brajlo, kaj kiu lanĉis novan normon de norvega 6-punkta (surpapera) brajlo, aktualigitan i.a. per enkonduko de brajlaj reprezentoj de la simboloj ĝeneraligintaj pro la disvastiĝo de la komputilo.

Fabelkonkurso 2008

A 1. La reveno de la ora pomo: Sonja MacGill, Hungario. 2. Sunbrilaĵo: Denis Iljin, Rusio. 3. Stulta museto: Polina Matvejeva, Rusio

B 1. Signoj de fantomoj: Katarzyna Lewak, Pollando. 2. Nomo de ĉevalo: Alicja Kraszewska, Pollando. 3. La plej bona horloĝo: Nikolas Mikolajewski, Pollando.

C 1. Kiam la ranoj havis felon: Miranda Wilson, Svedio. 2. DOR: Daniela Ungureanu, Rumanio

Grupoj

1. Papilietino verda: Alicja Cichowska, Katarzyna Lewak, Monika Mierzwiak, Andrzej Rybak, Pollando

2. Kolora mondo: Jaime kaj Jorge Paez Honan, Kubo

La premion FABELO INTERNACIA 2008 gajnis la fabelo verkita de Sonja MacGill, Hungario, "La reveno de la ora pomo". Fabelfesto okazis la 18-an de oktobro en Taivalkoski, Finnlando. Gratulojn al ĉiuj premiitoj kaj aliaj partoprenintoj! Dankon al la ĵurianoj, Raita Saliko Pyhälä, Sylvia Hämäläinen kaj Auli Vihermä. Dankon al UEA pro la premiolibroj kaj aŭspiciado de la konkurso!

Aini Vääräniemi, Taivalkoski

Ne karavano ĉi-jare

Kelkaj el vi eble atendis informojn pri ebla karavano al ĉi-jara kongresurbo Bjalistoko. Tamen por aranĝi tion necesus grupo de minimume dudek personoj, prefeble almenaŭ tridek. Laŭ paĝoj de UEA ĝis nun aliĝis nur dudeko de finnlandanoj al la kongreso kaj inter ili certe estas homoj, kiuj preferas uzi la aviadilon aŭ partopreni antaŭ- aŭ postkongreson. EAF do resignas ĉi-jare pri aranĝo de la komuna aŭtobusa vojaĝo, sed laŭ demando aranĝos ĝin al iu de la estontaj kongresoj.

Tiina Oittinen

La novtipa UEA-ekzameno premieris

Post kelkjara laboro, je la jarŝanĝo debutis la nova Esperanto-ekzameno konforma al la normoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro kun egalranga mezurado de la kvar bazaj lingvaj kapabloj en la niveloj B1, B2 kaj C1. En Internacia Festivalo (IF) en Düsseldorf 8 personoj el 6 landoj uzis la eblecon: 3 el ili elektis la nivelon B2 (forta meznivelo postulanta fluan parolkapablon, bonstilan memstaran verkadon, komprenkapablon de tekstoj el la ĉiutaga vivo) kaj 5 kandidatoj aliĝis al la pli supera nivelo C1.

Ekde nun eblos regule organizi tiujn normigitajn UEA-ekzamenojn en grandaj internaciaj renkontiĝoj aŭ aliloke, kie estos grupo de kandidatoj por almenaŭ unu el la tri niveloj. Por 2009 estas jam planataj ekzamensesioj dum PSI en St. Andreasberg, Germanio, inter 10-17 aprilo; dum la Malferma Tago en la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo, Nederlando) en majo; kaj dum la 94-a UK en Bjalistoko (Pollando) en julio.

Pli detalaj informoj pri la ekzamenoj troviĝas en: <http://www.edukado.net/pagina/NOVAJ+UEA-EKZAMENOJ/22422/>

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

110 vizitis ĉe UEA

La 29-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA en sabato, la 29-a de novembro, allogis 110 vizitantojn el 14 landoj. En la agadkalendario de UEA ĝi estis la lasta aranĝo dediĉita al la 100-jariĝo de la Asocio.

La ĉefa preleganto, ĉi-jara Grabowski-premiito Andreas Künzli, en siaj du prelegoj parolis pri la vivo de Hector Hodler, la fondinto de UEA, kaj la lokoj, kie troviĝis la Centra Oficejo dum la svisa periodo de UEA. Ĉi-jare ankaŭ Instituto Hodler '68 festis rondan datrevenon. Pri la celoj kaj historio de la 40-jara financa

subtenanto de UEA parolis Grégoire Maertens, ĝia preskaŭ dekomenca estrarano kaj longtempa prezidanto.

En la biblioteko Andreas Künzli prezentis sian imponan verkon "Universalaj lingvoj en Svislando", Ziko van Dijk lanĉis la gvidlibron "Vikipedio por vi", kaj Marek Blahuš parolis pri "Esperanta kulturo: Ĉu konservinda elektronike?" Aparte atendita estis la lanĉo de "Esperanto estas...", DVD, kiu en moderna, alloga maniero prezentas Esperanton por la ekstera mondo. La Libroservo de UEA vendis dum la tago librojn k.a. varojn por 2701 eŭroj. Pleje furoris "Vikipedio por vi", de kiu vendiĝis 12 ekzempleroj. Po 11 ekz. estis venditaj la Esperanta kaj franca versioj de la Esperanto-dokumentoj "Esperanto kaj lingva diverseco" kun intervjuo kun la fama lingvisto Claude Hagège.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

100-jara datreveno de Ivo Lapenna

Du gravaj datrevenoj en 2009: D-ro **L. L. Zamenhof** (150-jara) kaj Prof. D-ro **Ivo Lapenna** (100-jara).

La *Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna*, prez.: Prof. D-ro Carlo Minnaja (red. de *Eseoj memore al Ivo Lapenna*. 29 konataj aŭtoroj kontribuis al tiu ĉi ĉarma kaj interesa 417-paĝa verko), kaj la *Fondaĵo Ivo Lapenna*, prez.: D-ro Klaŭs Perko, instigas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn, E.-klubojn, E.-kunvenojn k.s. ĉie en la mondo celebri la du gigantojn per multaj ekspozicioj, prelegoj kaj artikoloj en la gazetaro pri ilia enorma, eminenta kaj elstara laboro por la Internacia Lingvo, Esperanto.

Ni invitas vin senpage utiligi la abundan materialon de nia hejmpaĝo: dokumentoj, paroladoj, fotoj ktp. (bv. indiki la fonton). Jen la adreso: **www.ivolapenna.org**

FEJO

Haluatko matkustaa Italiaan? Oletko FEJOn jäsen tai alle 30-vuotias? Tahtoisitko päästä kokeilemaan esperanton taitojasi käytännössä?

Tänäkin vuonna kahdella nuorella suomalaisella esperanton harrastajalla on mahdollisuus matkustaa Italiaan IJF-tapahtumaan Opetusministeriön rahoituksella. Italian esperantonuorten pääsiäisen aikaan järjestämä Internacia Junulara Festivalo eli IJF on jokavuotinen esperanto-tapahtuma, jonne tulee n. 100 osanottajaa eri puolilta Eurooppaa. Tänä vuonna tapaaminen järjestetään Giulianovassa, Adrianmeren rannalla. Tarkat tiedot tapahtumasta löytyvät osoitteesta <http://iej.esperanto.it/ijf>.

Jos siis olet kiinnostunut ilmaisesta matkasta Italiaan IJF:hon ensi pääsiäisenä, olet myös alle 30-vuotias ja puhut ainakin tyydyttävästi esperantoa, ota yhteyttä.

Lisätietoja ja vapaamuotoiset hakemukset osoitteeseen paula.niinikorpi@mail.com 28.2. mennessä.



FEJO strebas sendi du junulojn al Internacia Junulara Festivalo (IJF), Italio, ankaŭ ĉi-jare. La vojaĝ- kaj partoprenkostoj estos pagitaj pere de subvencio ricevita de la finna edukministerio. IJF okazos en Giulianova ĉe Adriatiko dum pasko 2009. La detalaj informoj troveblas ĉe retejo <http://iej.esperanto.it/ijf>. Se vi interesigās pri senpaga partopreno en IJF, estas sub 30-jarulo kaj parolas esperanton kontentige, kontaktu paula.niinikorpi@gmail.com ĝis la 28-a de februaro.



Retki Laatokan Valamoon

Ekskurso al insulo Valamo sur la lago Ladogo, Rusio

Kymmenennen Valamon kansanopistossa järjestettävän esperantokurssin päätteeksi tehdään retki Laatokan Valamoon, jonne ovat tervetulleita kurssilaisten lisäksi kaikki matkasta kiinnostuneet. Ennen retkeä voi tulla tutustumaan pariksi päiväksi Heinäveden Valamoon sekä esperantokurssiin. Torstaina on mahdollista osallistua kurssin ohjelmalliseen päätösillalliseen.

Retken suunniteltu ohjelma:

Lauantai 27.6.2009: Lähtö Heinäveden Valamosta klo 6.00 Joensuuhun, josta lähtö eteenpäin klo 7.00. Puolenpäivän aikaan saavutaan Sortavalaan ja lähdetään kantosiipialuksella kohti Valamon saarta. Valamossa odottaa suomenkielinen opas, jonka kanssa tutustutaan kävellen luostarin rakennuksiin ja kirkkoihin sekä alueeseen. Päivällisen jälkeen ohjelmassa on kuorokonsertti ja öinen vigilia-palvelus pääkirkossa. Majoittuminen 2- tai 3-hengen huoneissa, wc:t ja suihkut käytävällä.

Sunnuntai 28.6.2009: Aamiaisen jälkeen tutustutaan laajemmin luostarin alueeseen ja Valamon saareen. Paluumatkalle lähdetään klo 15.00 Sortavalaan, jossa kaupunkikierrros. Joen-

suhun palataan noin klo 21.00 ja Heinävedelle klo 22.00. Toinen mahdollisuus on matkustaa klo 18.30 Kiteeltä lähtevällä junalla suoraan Helsinkiin.

Retken hinta: 210 euroa/hlö (sis. menopaluumatkan Joensuu-Sortavala-Valamo, ryhmävii- sumin, illallisen, aamiaisen ja yöpymisen Laatokan Valamossa, oppaan ja matkanjohtajan palvelut, kirkkokonsertin Valamossa). Lisämaksu kuljetuksesta Heinävesi-Joensuu-Heinävesi 15 e/hlö. Hinnat voimassa 20 hengen ryhmälle. Matkatoimistona on joensuulainen Kulttuuri- ja Luostarimatkat Monasterytours.

Tarkemmat tiedot retkestä sekä ilmoittautumiset: Suomen Esperantoliiton sihteeri ja kursisivastaava Tiina Oittinen, sähköp. tiina.oittinen@pp.inet.fi, puh 050-5494709, muut yhteystiedot lehden sivulla 2.



Post la 10a kursosemajno en Popola Instituto de Valamo ekveturas el Heinävesi 2-taga ekskurso al la insulo Valamo sur la lago Ladogo, Rusio. Ni bonvenigas al la ekskurso ĉiujn interesulojn, ne nur la kursanojn. Je nia dispono estos finnlingvaj vojaĝgvidanto kaj loka ĉiĉerono, kies

informojn ni laŭbezone tradukos esperanten.

Jen provizora vojaĝprogramo:

Sabato 27.6.2009: Ekveturo el Valamo de Heinävesi je la 6a al Joensuu, de kie ekveturo je la 7a. Je la tagmezo ni atingos la urbon Sortavala en Rusio, de kie ni daŭrigos per ŝipo al la insulo Valamo. Tie nin atendas finnlingva ĉiĉerono, kiu montros piedirante al ni la monaĥejon, preĝejon kaj areon. Post la vespermanĝo estos en la programo korusa koncerto kaj nokta vigilia (diservo) en la ĉefpreĝejo. Tranoktado en 2- aŭ 3-litaj ĉambroj, necesejoj kaj duŝoj en koridoro.

Dimanĉe 28.6.2009. Post matenmanĝo plia konatiĝo kun la monaĥeja areo kaj kun kelkaj lokoj de la granda insulo. Reenveturo je la 15a per ŝipo al Sortavala, kie rondirado en la urbo. Je 21a ni estos denove en Joensuu kaj je 22a en Heinävesi. Alia ebleco estos preni trajnon al Helsinki je 18.30 rekte de Kitee.

Prezo de la ekskurso: 210 eŭroj/persono (inkl. vojaĝon Joensuu-Sortavala-Valamo tien-reen, vizon por la grupo, vespermanĝon, matenmanĝon kaj tranoktadon en Valamo de Ladogo, ĉiĉeronadon en Valamo kaj survoje, preĝejan koncerton en Valamo). Vojaĝo Heinävesi-Joensuu-Heinävesi 15 e/persono. La prezoj validas por grupo de 20 personoj. Respondeca vojaĝ-agentejo nomiĝas Monasterytours, Joensuu.

Pliajn, pli detalajn informojn vi ricevos de la kursogvidanto kaj sekretario Tiina Oittinen, retad. eafsekretario@esperanto.fi, tel 050-549 4709, adreso sur paĝo 2. Ŝi prenas ankaŭ viajn aliĝojn. Antaŭ la ekskurso eblas vizito al la esperantokurso kaj tiel ankaŭ konatiĝo kun la Valamo monaĥeja areo en Heinävesi. Vi povos veni ekzemple jam jaŭde, 25.6. kaj partopreni en la festan vespermanĝon de la kurso.

Tervetuloa mukaan! Bonvenon al la ekskurso!

EAF/Tiina Oittinen

Esperanto-Societo en Turku agadas

La jaro 2009 komenciĝis kun normala aktivado por Esperanto-Societo en Turku. La jarkunveno okazas la 6an de februaro en Civitana instituto de Aurala. En Aurala daŭrigas marde je 15.30–17.00 la esperantokurso, kiun gvidas la instruista grupo. Merkrede la grupo Diskutrondo legas interesajn esperantlingvajjn librojn kaj gazetojn en la kafejo Sirius de la ĉefbiblioteko en Linnankatu 2. Tie renkontiĝas ankaŭ la societaj membroj kun eventualaj gastoj. La tempo estas proksimume inter 16.30 kaj 17.30 kaj la renkonto okazas preskaŭ sen esceptoj. Cetere, nun eblas denove pruntepreni ĉiujn multnombrajn esperantlingvajn verkojn de la biblioteko, ĉar malfermiĝis renovigita la malnova biblioteka konstruaĵo. Bonvenon al Turku!

Estraro de EST

Printempo en Jyväskylä

La printempa programo de Esperantoklubo de Jyväskylä konsistas el tradiciaj studrondo kaj printempa ekskurso. La kunvenoj okazos en Sepänkeskus, Happi-ĉambro, Kyllikinkatu 1.

lundo 9.3. 15–18 Studrondo: Einari Vuorela, mezfinlanda poeto

lundo 23.3. 15–18 La ĝenerala printempa kunveno de la klubo

lundo 6.4. 15–18 Studrondo: La lagoj de Jyväskylä

lundo 20.4. 15–18 Studrondo: La malnova tombejo de Jyväskylä, promenado

lundo 24.5. 15–18 Studrondo: Muzikaj travivaĵoj en Jyväskylä

lundo 18.5. 15–18 Studrondo: Vizito en la produkto de sanaj plantoj en Laukaa

Fino de majo: Printempa ekskurso en la naturparko Isojärvi, Kuhmoinen

prezidanto Seija Kettunen,

040 867 2743, seija.kettunen@pp5.inet.fi

Surogato **vekilo**

Esperantosocieto Antaŭen el Tampere

Kio okazis en la 2008 en Antaŭen



Antaŭen ricevis novan prezidanton. **Tapani Aarne** devontigis sin ĉefi la societon kaj poste li ricevis ankaŭ kasistan postenon. Li laboris kiel instruisto de akordiono kaj pensiuliĝis en la somero. Nun li ankaŭ hobias multe por traduki vortaron en *lernu.net* al la finna helpante Teuvo Alavillamo.

Jukka Laaksonen kaj Markku Saastamoinen estis elektitaj kiel estraranoj de EAF, Esperanto Asocio de Finnlando.

En la vintro aperis la lasta Vekilo, ĝi estis tute kolora kaj estis unuan fojon redaktita sen papera originalo. Novajn redaktantojn ni daŭre serĉas.

La klubejo Nesto estis bone uzata. Ĉiun semajnon estis unuhora malfermita tempo, estraranoj deĵoris. Ofte vizitis iu membro

tie por babili. Unufoje en monato okazis kluba kunveno kaj ĉiun duan semajnon pensiularondo studis esperanton, instruisto estis Pentti Järvinen.

En la klubkunvenoj okazis sekvaj aferoj

Ni studis relativajn pronominojn, adjektivojn kaj adverbojn. Markku Sarastamo el Hämeenlinna vizitis, rakontis kaj montris bildojn el Japanio.

La jaro 2008 estis la jaro de lingvoj. Virpi Tyrkmen klarigis kia estas gesta signaro kaj ni mem diskutis pri la finnaj dialektoj. Jukka Laaksonen gvidis printempe la programon pri Roterdamo kaj Nederlando kaj aŭtune ni rigardis kongresajn bildojn de li kaj Sylvia Hämäläinen.

Soile Lingman el Stokholmo vizitis nian klubejon kaj rakontis pri Stokholma kluba agado kaj demandis pri nia agado.

Kio alia okazis?

Multaj niaj membroj ĉeestis la Vintrajn kaj Aŭtunajn tagojn de EAF. Dek unu personoj partoprenis vagadon de Birgitan polku en Lempäälä, kiun organizis esperantistoj el Jyväskylä. En Eurooppa-taga okazo en majo Antaŭen partoprenis per sia tablo.

Sylvia Hämäläinen faris dutagan kurson por blinduloj en Helsinko. Jukka Laaksonen legis lernolibron de Andrzej Pettyn sur KD-diskon por blinduloj. Sylvia havis ankaŭ naŭhoran kurson kun tri lernantoj. Anja Karkiainen donis intervjuon por la gazeto de Kansan Raamattuseura.

Ok niaj membroj partoprenis en la UK en Roterdamo kaj la karavanon de EAF per aŭtobuso. Françoise Rochette vizitis kaj koncertis ankaŭ en Tampere dum la Finnlanda turneo.

Esperantosocieto Antaŭen en la 2009

Estraro

Aarne Tapani, prezidanto
 Laaksonen Jukka, vicprezidanto
 Hämäläinen Sylvia, sekretario
 Hämäläinen Veli, membro
 Liukkonen Lauri, membro
 Karkiainen Anja, vicmembro
 Ström Marjatta, vicmembro
 Laaksonen Terhi, vicmembro
 Waltzer Seppo, vicmembro

NESTO estas malfermita – Bonvenon!

ĉiun lundon dum la tuta jaro, je la 16 -17a.

Adreso: Satakunnankatu 30 C 6,
 FIN-33210 Tampere.

Venu rigardi nian Neston kaj kunportu viajn geamikojn por konatiĝi kun la internacia lingvo Esperanto kaj nia agado. Aŭ cetere nur babili.

Estraranoj deĵoras tie kaj iliajn personajn adresojn kaj deĵorliston vi trovas en TTT-paĝo www.kolumbus.fi/veli.hamalainen/Esperanto.

Kio estas NESTO

Nesto estas nia klubejo kie ni povas kunveni kaj renkonti niajn membrojn kaj niajn geamikojn, finnojn kaj eksterlandanojn. Tie ni havas librejon kun 2600 libroj kaj sennombraj gazetoj.

La prezidanto Tapani Aarne:

”La rutina vivo de nia societo ĉi-jare pasis preskaŭ normale kiel antaŭe: La longtempa kasisto de Antaŭen kaj la redaktoro de Vekilo Veli Hämäläinen finis sian laboron kiel kasisto kaj redaktoro. Mi kore dankas lin pro lia gravega kaj multjara (ĉirkaŭ 28 jaroj) laboro por nia societo. Estas tre malfacile kompensi lian laboron, sed la vivo iru antaŭen! – Li tamen aktive daŭrigas plu en aliaj aferoj de la societo.

Nu – pli ekzakte vi povas legi pri okazoj kaj planoj de Antaŭen en la paĝoj de tiu ĉi **SurogatoVekilo** fare de Veli Hämäläinen. Dankegon al li pro tio.”

Okazoj en NESTO

Antaŭen kunvenas januare-aprile unufoje en la monato kaj aŭtune septembre-decembre. Dum somero ni havas neoficialan renkontiĝon en la ĉefbiblioteko de Tampere ĉiun lundon je la 17-18, post la deĵorado en NESTO, ek de fino de majo ĝis fino de aŭgusto.

Okazoj, klubkunvenoj, dum la vintro estas:

- 23.2. Jarkunveno, finne
- 9.3. Lingvaj problemoj
- 20.4. Ĉijara UK en Bialystok

Someraj renkontiĝoj komencos 25.5.2009 lunde en la urba ĉefbiblioteko METSO kaj daŭras ĝis 24.8. Vizitantoj estas bonvenaj al niaj kunvenoj kaj someraj renkontiĝoj.

Nia pensiula-studrondo daŭras studi ĉiun duan semajnon dum vintro kaj aŭtuno. Gvidas Pentti Järvinen.

Sylvia Hämäläinen estas preta instrui mallongajn studtempojn se ni trovas lernantojn.

La urbo Tampere faris novan ĝemelurban kontrakton, en la 2a de decembro, jam la 17an. La urbo estas Guangzhoun el Ĉinio. Tie troviĝas ankaŭ esperantisto FD-delegito.



Veli kaj Sylvia

LA REVENO DE LA ORA POMO

Iam estis kunikleto, hundeto kaj katido. La kunikleto nomiĝis Fifi, la hundeto Bruno kaj la katido Ketu. La kunikleto havis oran pomon, kiun ĝi ricevis de la Panjo. Ne demandu kiel ŝi akiris ĝin – verŝajne ŝi iam renkontis sorĉistinon. Unu tagon Fifi iris naĝi en lago, proksime al la familia loĝejo. Ŝi lasis la oran pomon sur la tero, apud siaj sun-okulvitroj. Ŝi ne tro ĝuis la naĝadon, ĉar la lago estis tre malpura. Kiam ŝi revenis al la bordo, ŝi ne povis trovi la oran pomon. Mankis ankaŭ la sunokulvitroj. Ŝi serĉis la herbejon kaj arbustojn apude, sed trovis nenion. Ŝi perdis la oran pomon. Plorante, ŝi iris hejmen kaj rakontis ĉion al la Panjo.

La postan tagon ŝi rakontis ĉion denove al Bruno kaj Ketu. La tri amikoj konsentis serĉi ĝin. Unue, ili serĉis denove ĉe la lago-bordo. Fiŝo elsaltis el la akvo, kaj ili demandis al ĝi ĉu ĝi vidis oran pomon. Ĝi vidis ĝin, sed ĝi vidis ke granda urso venis kaj prenis ĝin kaj foriris kun ĝi al sia kaverno. Do, la trio serĉis tiun loĝlokon. Trovinte ĝin ĉe flanko de monto, ili frapis sur la pordo. Ili aŭdis bruojn de interne, io batiĝis kontraŭ iu meblo kaj graŭle blasfemetis: “Je la diablo, kial estas tiom mallume ĉi tie? Mi vidas nenion! Mi maljuniĝas – mia vidkapablo forlasas min. Atendu momenton, frapuloj, mi venas!” Vere, post momento aperis la urso, tenante sian dolorantan piedon.

“Bonan matenon, sinjoro Urso.”

“Bonan matenon. Kiuj vi estas kaj kion vi deziras?”

“Mi estas Fifi – ĉarma kunikleto, jen miaj amikoj Bruno – ĉarma hundeto, kaj Ketu – ĉarma katido.

“Hmm”, muĝis la urso: “Mi ne vidas tiom da ĉarmo ĉe vi.”

“Eble se vi forprenus tiujn sunokulvitrojn, vi vidus pli klare.” sugestis Bruno.

“Fakte, viaj sunokulvitroj estas ĉarmaj kaj modaj, sed ne tro praktikaj en via kaverno.” komentis Ketu.

La urso forprenis la sunokulvitrojn kaj tuj ĝoje kriis: “Ha! Mia vidkapablo estas rebonigita; mi estas junulo denove!” Je tio li saltis ĝoje en eta rondo kaj ĉesis nur kiam li batis sian alian piedon ĉe alia meblo.

“Fakte,” diris Fifi: “Tuj sunokulvitroj ja estas ĉarmaj kaj modaj. Nur... iom tro malgrandaj por vi. Ili tre similas al la okulvitroj kiujn mi perdis hieraŭ!”

“Hmm, perdis. Ĉu perdis? Nu, kaj...”

Fifi komparis sian grandecon kaj forton kun tiuj de la urso.

“Nenion.” ŝi diris: “Ĉiuokaze, mi venis por demandi ion alian.”

Grandeco kaj forto ne abundis ĉe Fifi, sed kuraĝo, jes.

“Ĉu vi havas mian oran pomon?”

“Nu,” respondis la urso: “mi havas pomon, kaj fakte ĝi estas ora, sed laŭ mia opinio, ĝi estas mia!”

“Vi eraras! Tiu ora pomo estas mia! Mia Panjo donis ĝin al mi por mia tria naskiĝtago.”

“Hmmm” grumblis la urso, frotante alterne sian piedon kaj mentonon: “Mi donos ĝin al vi, se vi donos al mi ion de egala valoro.”

“Ekzemple?”

“Ion alian el oro – ekzemple oran fiŝon.”

“Sed mi ne havas oran fiŝon.”

“Do, neniu interŝanĝo.”

Sed la kuniklo memoris pri la fiŝo kiun ĝi vidis en la lago. Ĝi estis ora fiŝo!

“Tamen, mi scias kie trovi oran fiŝon! Mi povos porti ĝin al vi. Ĉu vi havas loĝejon por ĝi?”

“Jes, mi havas fiŝujon – akvarion. Envenu, kaj mi montros ĝin al vi.”

Fabelo 2008. Pseudonimo: okulo

La tri amikoj eniris en la kavernon. Ja estis mallume, eĉ sen sunokulvitroj. Sed ili vidis belan akvarion. En ĝi ili vidis du fiŝojn, unu arĝentan fiŝon kaj unu bronz-koloran fiŝon.

“Mi ŝatas fiŝojn” diris la urso: “Estas konate, ke ursoj ŝatas fiŝojn. Mi amas kaj admiras miajn fiŝojn kaj mi manĝ... manĝigas ilin ĉiutage. Sed mi ĉiam volis kompletigi mian kolekton – per aldono de ora fiŝo.”

“Do, mi portos al vi oran fiŝon, kaj vi redonos al mi mian oran pomon – kaj cetere miajn mondajn okulvitrojn.”


“Konsentite” diris la urso.

La tri amikoj adiaŭis al la urso kaj reiris al la lago. Ili kriis: “Fiŝo, fiŝo! Venu al la bordo!”

Post kelkaj minutoj, aperis la fiŝo. Ĝi rekonis la tri amikojn. “Saluton!” ĝi diris: “Ĉu vi sukcesis ricevi vian oran pomon?”

“Ne, ankoraŭ ne! Sed povus okazi! Ĉu vi ne dezirus loĝi en bela akvario? Kun pura akvo kaj regula manĝigo!”

“Hmmm. Mia lago ja estas malpura, kaj mi malfacile trovas manĝaĵojn. Sed krome, kaj ĉefe, en la lago mi nun estas sola. Ĉiuj el miaj amikoj fornaĝis aliloken. Mi ne volas esti sola en eta akvario, eĉ kun multaj manĝaĵoj.”



“Tie vi ne estos sola. Vi havos amikojn!” diris Fifi.

“Eĉ du amikojn.” aldonis Bruno.

“Estas unu arĝenta fiŝo...” diris Ketj.

“...kaj unu bronz-kolora fiŝo.” finis Fifi.

“Hmmm. Agrable.” diris la fiŝo: “Kaj, neniun ora fiŝo tie?”

“Neniu. Vi estos la sola: – vi estos la ĉampiono. Ĉu vi konsentas transloĝi?”

“Ĉu la mastro de la akvario estos bonkora kaj zorgema?”

“Ho, jes,” respondis Ketj: “li kelkfoje diris, ke li tre ŝatas fiŝojn.”

“Do, mi konsentas.”

“Bonege. Do, mi plenigos ĉi tiun platan sakon per akvo kaj vi ensaltu.”

Post duona horo la ora fiŝo vere eniris la ak-

varion kaj sin prezentis al la du aliaj fiŝoj. Ili ĝoje ĉirkaŭnaĝis.

La kuniklo ricevis siajn sunokulvitrojn kaj la oran pomon. Kontentaj, la tri amikoj iris hejmen. Ĝoje, Fifi montris la oran pomon al la Panjo kaj rakontis ĉion.

La tri amikoj vivis feliĉe kune dum multaj postaj jaroj.

Kaj la ora fiŝo? Ni ne scias. Eble ekestis multaj belaj fiŝetoj. Aŭ eble io alia.

Estas konate, ke ursoj ŝatas fiŝojn.

(la verkinto/rakontinto estas ok-jara, kaj havas akvarion kun fiŝetoj hejme – kaj kuniklon – kaj hundeton.)

Esperantoyhdistyksille

Esperantolehti toivoo saavansa julkaistavaksi kaikenlaisia uutisia paikallisyhdistysten tapah-
tuneesta ja tulevasta toiminnasta. Kaiken leh-
teen tarkoitettun materiaalin voi lähettää sähkö-
postilla päätoimittajalle osoitteeseen *mmakita@
utu.fi*. Helpoimmin ja varmimmin kaikki toimii,
kun tekstit lähetetään x-systeemillä kirjoitettu-
na suoraan viestikentässä tai liitetiedostona
rtf-muodossa. Muutkin tavalliset tekstitiedosto-
tyypit ovat yleensä toimineet ja luonnollisesti
myös kaikki paperipostina lähetetty materiaali
otetaan huomioon. Voi myös lähettää yhdistyk-
sen jäsentiedotteen, josta päätoimittaja tarpeen
mukaan lyhentäen koostaa uutisen.

Kuvat voi lähettää sähköpostin liitetiedosto-
na mieluiten jpg-muodossa. Kuvien resoluution
olisi hyvä olla n. 1000 pikseliä leveysuunnas-
sa. Voi myös lähettää paperikuvia postissa pää-
toimittajalle.



*Oulun esperantoseuran pikkujoulussa nautittiin
esperantokakkua. Esperanto-societo de Oulu havis
esperantokukon en sia juleta festo.*

Aliaj gazetoj

Franca kantisto en lernejo de Laitila

Laitilan Sanomat skribis 23.9.2008 pri Françoise Rochette, kiu kantisto en lernejo de Myllymäki en Laitila. Tio estas proksimume 60 kilometroj norde el Turkuo. Françoise aperis al 400 lernantoj. Ŝi faris turneon en Finnlando. Nomo de turneo estas *Tra la mondo*. Françoise kantisto en esperanto kaj ankaŭ en itala, ĉina, rusa, hispana, greka kaj franca. Ŝi kantisto tangojn "Satumaa" en esperanto kaj aperis gaje kaj kun entuziasmo. Françoise estis nudpiede.

Grava parto de evento estis parto de Tuomo Grundström, kiu tradukis kaj rakontis pri kantoj. Eĉ malgranda priskribo de kantoj helpis kompreni enhavon.

Jukka Noponen

Eventokalendaro de EAF

2009

- 14.-15.3.2009 Vintraj Tagoj kun jarkunveno en hotelo Sommelo, Kuusankoski/Kouvola
- 22.-26.6.2009 Esperantokurso en Popola Instituto de Valamo, Heinävesi kun posta ekskurso al Valamo de Ladogo
- 25.7.-1.8.2009 Universala Kongreso de Esperanto, Bjalistoko, Pollando
- Septembro 2009 Aŭtunaj Tagoj en Pori

Naskiĝis

La unua novulo en la noveformita municipo Ĉimito estas filino Sigrid (8.1.) de **Anna Ritamäki** kaj Per Olof Sjöstrand. Gratulon kaj bondeziron de EAF al la gepatroj, avino Carola kaj la etulino.

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon:

Ilkka Santtila, Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@welho.com.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ www.esperanto.fi/helsinki jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 ☎ onni.kauppinen@pp.inet.fi
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen) Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 040 867 2743 ☎ www.esperanto.fi/jyvaskyla
- ♦ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kallioaamankatu 10, 15150 Lahti. ☎ martti.pennanen@phnet.fi
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Olli Pajula), Salamakuja 4 as 2, 90420 Oulu. ☎ <http://esperantooulu.info/> olli.pajula@gmail.com
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☎ matti.wallius@ebaana.net
- ♦ Esperantoseura Antaüen ry. / Esperantosocieto Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 ☎ tapani.aarne@mbnet.fi)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärrvägen 89, 25700 Kimi-to. ☎ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 445023-283606
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 ☎ steleto@pp.inet.fi
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ fejo@esperanto.fi. Tilinro: 563000-2213606

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 14 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta. Aktiivisia harrastajia on mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna

aperas dum la jaro

2009

| Nro | Red.grupo komencas | Limdato | Aperas |
|-----|--------------------|---------|--------|
| 2 | 10.3. | 15.3. | 5.4. |
| 3 | 10.5. | 15.5. | 5.6. |
| 4 | 10.7. | 15.7. | 5.8. |
| 5 | 10.9. | 15.9. | 5.10. |
| 6 | 10.11. | 15.11. | 5.12. |

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro: Jäsenet / Membroj:

1/1 sivu/paĝo 100 e 1/1 sivu/paĝo 50 e

1/2 sivua/paĝo 60 e 1/2 sivua/paĝo 30 e

1/4 sivua/paĝo 40 e 1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redakto:

eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la

oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu

15 C 65, 00530 Helsinki.



Jarkomenca prediko

Malnova ŝerco aplikebla al ĉiuj epokoj kaj sistemoj: "Ĉu oni en via najbara/alianza/reganta/lando estas viaj amikoj?" "Pli, ili estas niaj fratotoj." "Kiel fratotoj?" "Amikotojn oni povas elekti."

La ŝerco celas kompromitigi politikajn sistemojn en kaj aliancajn rilatojn inter ŝtatoj, rilatojn kiuj ne lasas alternativojn. Kiel akra satiro ĝi bone funkcias.

Sed kion vere signifas esti "amiko" aŭ "fratoto"? Se ni difinas kiel en la supra ŝerco, ni venas al difino plej serioza.

Individuo povas persone koni kelkajn aŭ kelkdekojn, maksimume kelkcentojn da homoj. Ili – aŭ iuj el ili – povas esti amikotoj laŭ tiu difino. Por elekti oni devas koni. Tion signifas esti amiko. Facilas esti amiko, elekti kion fari kun kiu. Parto de nia ekzistado estas bazita sur tio – la plej granda parto, la plej grava parto en nia individua ekzistado. Pli vastaj amikaj kolektivoj estas lokaj kaj retaj amikotoj. Tiuj povas esti eĉ tre vastaj, sed ĉiam limigitaj. Ili alprenas kaj ekskludas.

Niaj elekto tamen ne kreas kondiĉojn de la kolektiva ekzistado de ĉiuj homoj. La kolekti-

vaj kondiĉoj por plua ekzistado de la homaro fariĝas en interdependeco. La globo ne ĉiom eltenas. Homoj kiel individuoj havas siajn aspiratojn teni sin vivaj kaj bonstataj, laŭ eblecoj.

La neceso vivi de la tuta homaro faras, ke amikotoj restas interesogrupoj, kaj inter ili objektive troviĝas kontraŭdiroj. Kontraŭdiroj inter diversaj amikotoj devas esti renkontataj. Homoj kaj iliaj amikotoj povas esti inter si amikotoj. Tion fari ili *povas* kaj ja faras, sed kion fari ili *devas*: Transvivi sen detrui unu aliajn nek la globon – ne estas elekto. Ili estas fratotoj.

Frateco simple por transvivi estas necesa ne nur inter homoj. Ni kutimas paroli pri naturamikeco. Kiu ja ne estus amiko de la naturo. Foje naturamikeca turismo signifas longajn veturadojn kaj pezan konstruadon de servoj. Amikeco kun la naturo do povas esti misproporcia: Ni ĝuas tion kion ni perceptas naturo, kaj tio kostas al tiu amika naturo sufokiĝon, detruon pro la polucia industria agado de ni homoj. Naturo ne estas amiko kun ni, ĝi estas fratoto. Ĝiajn reagojn ni ne povas elekti.

Ni amiku kun niaj fratotoj.

Tuomo Grundström

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy huhtikuussa. Jutut 15.3.2009 mennessä päätoimittajalle. La venonta numero aperos en aprilo. Artikoloj ĝis 15.3.2009 al la ĉefredaktoro. Osoite/adreso: Mikko Mäkitalo, Vanha Hämeentie 64 as. 1, 20540 Turku, puh/tel. (02) 2373 848, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.

Kopio Niini/Cityoffset, Tampere 2009